

**MUUSSES**

**ESPERANTO BIBLIOTEKO**

REDAKCIO: J. GLÜCK, T. JUNG KAJ J. H. J. WILLEMS

No. 9

**LA ĴUSNASKITO**

NEKREDEBLA HISTORIO DE

**RICARDO BECERRO DE BENGOA**

EL LA HISPANA ORIGINALO TRADUKIS

**JOSÉ FERNANDO BERENGUER**




ESPERANTO-ELDONEJO

**J. MUUSSES — PURMEREND**

(Nederlando)

4940



M U S S E S  
E S P E R A N T O B I B L I O T E K O

REDAKCIO: J. GLÜCK, T. JUNG KAJ J. H. J. WILLEMS

No. 9

LA ĴUSNASKITO

NEKREDEBLA HISTORIO DE  
RICARDO BECERRO DE BENGOA

EL LA HISPANA ORIGINALO TRADUKIS  
JOSÉ FERNANDO BERENGUER



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



ESPERANTO-ELDONEJO  
J. MUUSSES — PURMEREND  
(Nederlanda)

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj

Copyright 1937

by

J. MUUSSES

—

PURMEREND

## 1.

Iun posttagmezon de Aŭgusto de l' jaro pasinta, 1870, mi alvenis, lacega pro marŝado tra la montaro, al la urbeto Berunegui en la minregiono de San Blas, proksime al la urbo Legutiano, ĝuste kiam moviĝis al la tombejo grupo da kamparanoj. Ili akompanis la kadavron de infano. Ĉirkaŭita de floroj kaj kuŝigita sur kuseno, ĝi estis portata de maljunulino en kruda lulilo sur la kapo, laŭ la kutimo de tiu regiono.

— Kies estas la etulo? mi demandis.

— Neniu scias tion, sinjoro, respondis al mi vilaĝano.  
— Pli strangan aferon oni neniam vidis. Oni trovis tiun infanon vivanta, nuda, tie en la kanejo, antaŭ proksimume du jaroj. Oni akceptis ĝin en la domo de Gusurrandi, kaj iom post iom ĝi kuntiriĝis, ĉesis mamsuĉi kaj fariĝis ruĝa, kvazaŭ ĝi estus ĵus naskita. Stranga afero! Ĝi havas sulkojn en la vizaĝo kiel maljunulo, kaj la manojn bruldifektitaj kaj makulitaj kiel ni, kiuj fumas pipon.

Ĉio ĉi supermezure ekscitis mian scivolon. Mi aliris al la funebrantaro kun la intenco vidi la kadavron. Antaŭ ĝia entombigo, dum la virinoj preĝis kaj ploris, mi ekzamenis ĝin. La vilaĝano estis prava: tiu etulo prezentis aspekton nekomprenoblan. Imagu ĵusnaskiton kun frunto kaj vangoj sunbruligitaj kaj plenaj de malmolaj

kaj kalaj sulkoj, kun esprimo markita de inteligenteco en liaj duonfermitaj okuloj, kaj kun montr-o kaj dik-fingroj de ambaŭ manoj flavetaj kaj nigriĝintaj same kiel ĉe maljunaj fumantoj.

Oni enterigis la infanon. La virinoj montris grandan timafekton. Mi reiris al Berunegui kun la homoj de la enterigo, por pasigi la nokton en la domo de Gusur-randi.

— Je kio mortis tiu infano? mi demandis la domanojn.

— Ho, sinjoro. Rikardo, respondis la dommastrino, tio devas esti afero de sorĉistinoj, ĉar pli strangan aferon oni neniam vidis en la tuta mondo. Kiam ni trovis lin en la kamparo, li manĝis bone maizan panon, fumaj-tan viandon kaj supon. Poste elfalis la kvar dentoj, kiujn li havis, kaj li ĉesis manĝi kaj li ĉesis nin koni kaj priatenti la personojn, kaj ni devis igi lin mamsuĉi, kaj eĉ tion li forgesis en la lastaj tagoj de sia vivo. Antaŭe li estis sufiĉe granda, sed iom post iom li duoniĝis. La plej stranga estas ke li rigardis kiel plenkreskinto kaj sin movis, kvazaŭ li volus paroli; li estis ĉiam vigla, kaj ŝajnis kompreni ĉion, kion ni parolis.

— Kaj ĉu vi ne konjektas, de kie li povus veni?

— Ne, sinjoro. Iun tagon, revenante de la laboro, ni trovis lin nuda inter amaso da malnovaj vestoj. Ni tre kompatis kaj kunprenis lin. En la vestaĵoj li havis paper-rulaĵon kaj pipon.

— Kie estas tiuj objektoj?

— En kofro mi havas ilin, aldonis la domestro. — Pro tio ke mi ne scias legi, mi neniam pensis ilin el-preni de tie. Krome, iun tagon mi montris ilin al la sin-

joro parohestro, kaj li diris al mi, ke ili estas skribitaj en iu vaska lingvo, kiun li ne komprenas.

— Alportu, alportu ilin! mi ekkriis, plena de ĝojo.

— Mi alportos ilin, jes, sinjoro; sed vi legos ilin al ni ĉiuj, he?

— Jes, amiko Gusurrandi, al ĉiuj, kaj tiel klare kiel eble.

— Unue ni vespermanĝu! diris la dommastrino, leviĝante de sia seĝo.

Tion ni faris, dum la krepuskado, sub la belega vinberlaŭbo de la fruktoĝardeno. Kiam noktigiĝis, oni lumigis kandelon kaj metis ĝin al mia flanko; la viroj plenis kaj bruligis siajn pipojn; la virinoj aranĝis la punktojn de siaj kufoj kaj la faldojn de la antaŭtukoj. Ĉiuj formis larĝan rondon, eksidinte sur la lignaj seĝoj ĉirkaŭ mi. Kaj mi malvolvis la faskon da paperoj, kiun al mi donis la domestro. Ĝi konsistis el multaj folioj diversaj, de diversaj formatoj kaj manskriboj. Metinte ĉion en ordon, mi eklegis, kio sekvas, je laŭgrade kreskanta scivolo kaj de mi kaj de ĉiuj miaj aŭskultantoj:

„Jus mi finis mian 85-an vivojaron, la 20-an de Aŭgusto 1785, kaj mi troviĝis en la kuirejo de mia belega bieno, sidante ĉe tablo kun Don Juan Manuel de Ursúbil, bonkonata sanigisto de la regiono, homo multe studinta; ni estis intimaj amikoj jam de frua juneco.

Miaj gefiloj kaj genepoj jam sin retiris al sia domo, festinte en tiu vespero la datrevenon de mia naskiĝo, kaj en mia loĝejo estis solaj la sanigisto kaj mi, kaj maljuna servistino, kiu nin priservis. Estis la unua matene, kaj ni estis fumintaj jam tridek kvar pipojn kaj trink-

intaj kvin kruĉojn da „sagardúa” (pomvino). Mi estis tiam forta kaj brava kiel kverko, viglanima kaj kun eksterordinara korpokonstitucio; sed malgraŭ tio, pro la multa drinkado kaj fumado mia kapo komencis ŝanceliĝi kaj miaj okuloj — ekvidi viziojn. La sanigisto statis eĉ pli malbone ol mi. De pli ol unu horo li senĉese parolis pri fluidaĵoj, ŝlosilostoj, sistemoj, plastroj kaj aliaj aferoj, pri kiuj mi eĉ vorton ne komprenis. Mi aŭskultis lin silente.

— Ĉu vi ne respondas al mi? li demandis.

— Kion mi respondu?

— Diru al mi ion, homo! Pri kio vi pensas?

— Pri tio ke mi jam estas tre maljuna kaj nur mallonge vivos ankoraŭ.

La sanigisto donis pugnobaton al la tablo; li ekridis kaj kriis:

— Mallonge! Kia sensencaĵo! Mallonge! Vi povas vivi tiom longe kiom ajn vi deziras.

— Ĉu vere?

— Vere. Mi havas senmankan sekreton por neniam morti. Sed mi timas; se oni tion eksciis publike, oni kredus min sorĉisto, kaj mi malbone fartus.

— Juan Manuel, ĉu vi diras al mi la veron?

— Nepran veron. Ho, se mi trovus iun, kiu ne volus morti.

— Multajn vi trovos.

— Vi eraras. La homoj estas tre strangaj en sia pensmaniero. Ili timas la morton, sed timas pli la operacion, kiun ili devas suferi por ne morti, t.e. eĉ sciante ke ili ne mortos, ili volas prefere morti ol suferi dum kelkaj tagoj. Ili estas sensenculoj!



Mia kapo ardis. Tiu saĝa homo sin esprimis kun tia konvinko, ke mi imagis jam la malekziston de la morto. En mia interno mi sentis nekompreneblan kontentiĝon. La okuloj de l' ebria sanigisto ŝajnis al mi la eklumoj de estaĵo supera kaj mirakla, kiu estas ekspedonta min en senfinan ekzistadon.

Ni trinkis kelkajn pliajn glasojn. La fumo el niaj pipoj plenigis la ĉambron. Sidante surtere, ĉe la forno, la servistino dormis, lasinte fali la trikaĵon el la manoj, kun kies volvaĵo gaje ludis la katoj.

— Kaj kial vi ne faras la provon kun vi mem? mi demandis la sanigiston.

— Kia sensencaĵo! Kiel mi povas min mem operacii, ĉar mi bezonas por tio la aplikon de mia tuta observkapablo, de mia tuta sano kaj de ĉiuj miaj fortoj?

Ni silentis tempeton. Miaj 85 jaroj tre pezis sur mi; mi nun sciis, ke sen kontraŭrimedo nova vivo vokas min. Mi decidiĝis.

— Mi ne volas morti! mi ekkriis, subite leviĝante. — Disponu pri mi!

— Tuj! rediris Juan Manuel, plezure frotante siajn manojn. — De nun ĝis pluaj 80 aŭ 80 mil jaroj ni re-trinkos „sagardúan” la 20-an de Aŭgusto.

Poste li leviĝis ŝanceliĝante, ekprenis min ĉe le brako kaj diris:

— Ni iru!

## II.

— Kien?

— Al mia domo; en ĉi tiu nokto mem ĉi, estos farita.

— Ni iru.

Kaj en ĉemizmanikoj, laŭ nia tiama stato, ni donis la brakon unu al alia. Puŝkontuzante nin ĉie, ni direktis nin al lia domo.

Li malfermis la pordon per unu puŝo, faris lumon per fajrilo, ekbruligis la meĉon de kandelo pendanta ĉe la unua fosto de la ŝtuparo, kaj ni supreniris al lia ĉambro. La sanigisto pendigis la kandelon, formetis ĉapelon kaj jakon kaj malfermis tirkeston de tablo, elprenis aparaton kunmetitan el dikaj metalfadenoj, volvaĵoj kaj vezikoj kun lignaj ŝlosiloj. Poste li suprenfaldis la manikojn kaj altiris liton el apuda alkovo en la mezon de la ĉambro, metis apud ĝin grandegan kupran kaldronon kaj diris al mi ridante:

— Etendu vin en ĉi tiu lito kaj..... ne movu vin!

Mi estingis la pipon, frapante ĝian buŝparton mal-supren kontraŭ la muron, metis ĝin en mian zonaĵon kaj faligis min en la liton, etendante min laŭpove. La sanigisto eltiris sian lanceton, palpetis mian maldekstran brakon kaj faris al mi larĝan tranĉon en iun vejnon.

Mi ekaŭdis la bruon de l' sangoŝpruco, kiu falis en la kaldronon. Dume Juan Manuel preparis sian strangan aparaton. Ĉe tiu ĉi agado ŝajnis pasi pli ol kvaronhoro. Mia sango daŭris elfluadi, kaj mi sentis min terure malfortiĝanta. La ebrio pro la „sagardua” estis komplete malaperinta. Tiam kaj tiam la sanigisto palpis mian pulson kaj diris, daŭrigante sian laboron:

— Pli! Pli!

Kaj denove pasis mi ne scias kiom da tempo!

Fine alvenis momento, en kiu mi konstatis ke mi ne povas plu min movi. Mi soifis, ne povis formi eĉ unu

vorton, kaj aŭdis nur la unutonan bruon de l' sango falanta en la kaldronon. Mi vidis bone, mi vidis eksterordinare; tia estis la stranga klareco kiun alprenis miaj okuloj. La sanigisto repalpis la pulson.

— Bone! lomete pli... kaj sufiĉe! li ekkriis.

Kaj li restis ĉe mi, rigardante min longtempe.

Poste li ligis la vundon, metis sian manon sur mian koron kaj, preninte malgrandan strion da tolo trempita en akvon, li enmetis ĝin en mian buŝon ĝis la gorgo, enpuŝante ĝin per la tenilo de ligna kulero. Poste li kovris mian nazon per kelkaj pecoj da malseketa stupo.

— Tiel! li diris, tiel ni statas bone. Nun spiru malmulte, tre malmulte, preskaŭ neniom; la koro apenaŭ moviĝu. Ni atingos staton ĝis unu paŝo antaŭ la morto, sed ne tuŝos ĝin.

Mi troviĝis en nepriskribebla stato. Mi sentis nenian doloron; ŝajnis al mi, ke mi ne havas korpon, ĉar nur en la kapo mi rimarkis varmon kaj vivon. Sed mi sentis grandan premon en la brusto, kvazaŭ la ripoj distiriĝus kaj kvazaŭ oni min pikus en ĉiuj artikoj, kiam ĉiun kvinan minuton mi spiris iom da aero tra la malsekiĝita tuko. Mia kapo ardegis kaj la maloftaj pulsobatoj de l' koro resentiĝis en miaj tempioj kaj en miaj oreloj kiel martelbatoj.

Juan Manuel, min observinte, alportis kruĉon plenan de pomvino kaj trinkis el ĝi grandan gluton.

— Estas necese, li diris al si, ke mia pulso ne tremu. Ho amiko! Kiom da memplantitaj rokokverkoj ducentjaraj vi devos ĵeti mem en la fajron! Kiam vi estos vivinta kelkajn jarojn plu, mi instruos al vi mian sekreton, kaj vi operacios min, kaj ankaŭ mi mem estos nemort-

ema. Ho, mi estu singarda! Se ĉi tie estus iu, kiu min aŭskultus!

Dirante tion, li rigardis al ĉiuj anguloj de la loĝejo, malfermis kaj fermis zorgeme la fenestron, kaj ree metis sian manon sur mian koron.

— Ne mankas al vi, por atingi la morton, pli ol la diko de haro, sed ĉi tiun hardikon ni ne transiros.

Li eliris el la ĉambro kaj revenis post nelonge kun unu el siaj nepoj, kvarjarulo, sur la brakoj. La bela infano ŝajnis profunde dormi.

Li kuŝigis lin apud min, faris al si la krucoŝignon kaj kovris miajn okulojn per poŝtuko. Poste li eksidis, supoze, sur la rando de mia lito, kaj dum li rigardadis min, li parolis per voĉo naza kaj interrompita:

— Ĉi tio funkcias bonege! Nu, estas ja klare! La armaturo de mia amiko estas malnova, rustmordita de la tempo. Ĝi inklinas al morto, ne en la ostoj, kiuj daŭras jarcentojn, sed en la sango, kiu estas komplete eluzita. Nu bone, ni do plenigu la armaturon per io nova, bone nutrita, kio tendencas al la vivo. Bona fluidaĵo kaj bona suko produktas bonan planton. Abundo estas vivo, malabundo estas morto; en homo maljuna la fonto estas elĉerpita, kaj li mortas pro malabundo. Se mi iras sen mono en drinkejon, ili ne donas al mi eĉ unu guton. Do estas klare, se karno kaj ostoj ne enspezas, ili kuntiriĝas, sulkiĝas, kaj sekiĝas. La vivo ne povas havi lokon en korpo mallarĝa, rompita, kartoniĝinta. Vi vivos, amiko mia! Mia intenco verŝajne venis en la kapon de multaj, sed... Ĉi tiu sed! estas la formulo de l' nescio kaj de l' timemo de la homaro. Mi estas tre granda homo; estas vere, ke mi legis neniun libron, nek studis ĉe iu, sed.....! Al la

diablo la sed! La sango en movado estas kiel generanta viruso (infektilo); se ĝin tuŝas la aero, ĝi steriliĝas; ĝi estas kiel fiŝo: se oni tiras ĝin al la aero, ĝi mortas. La nuna problemo estas do jena: la aero ne tuŝu la regenerantan sangon; ĝi devas flui pura, varma, plena de vivo, potence pulsanta, de la koro de l' infano al tiu de l' maljunulo, jam proksima al la morto. Ho, tio estas mirakla kaj ne prezentas iun danĝeron. La maljunulo perdas sian sangon; ĉi tie ĝi estas en la kaldrono kaj ŝajnas argilaĵo. Tio estas la 85 jaroj kun ĉiuj siaj malmoblaĵoj kaj doloroj. Tio estas la rustmanĝita armaturo. La infano transdonos al li preskaŭ sian tutan sangon. Sed tio ne gravas; la infano restos dum unu semajno malforta, kaj poste la malmulta sango nun al ĝi restanta estos multobliginta kaj la infano kontinuos vivi plenforta. La sango estas fajro. Unu sola guto servas kiel bazo por unu vivo, kaj ĉi tiu — al tuta generacio. Kio alia estas ni ol unu sangoguto transformita! Mi ja scias ke ekzistas doktoroj en Salamanko, en Oñate kaj en Alkalao, kiuj ridus pri mi. Estas unu el la privilegioj de homoj de la scienco povi ridi senpune pri la ceteraj, ĉu ili estas pravaj aŭ ne. Kiam mia amiko havos 2000 jarojn, kie estos la doktoroj de Salamanko? Jes, tiam ni mem ridos pri ili!

Denove li metis la manon sur mian bruston. Mia koro apenaŭ batis. La muĝetado en miaj oreloj estis silentiĝinta.

— Jam estas tempo! li ekkriis. — Jam li nenion plu sentos.

Kaj malkovrinte miajn okulojn, li prenis la strangan aparaton, kiun li havis sur la tablo, kaj ĉirkaŭvolvis mian kolon per ties volvaĵoj. La samon li faris al la in-

fano, kiu restis senmova apud mi. El potoj li elprenis dubenigran ŝmiraĵon, per kiu li ŝmiris ĉiujn ŝraŭbojn, kaj per kiu li ankaŭ umis mian gorĝon, escepte de unu flanko, kie li helpe de kupo (malgranda kloŝeto) faris funeleton el mia haŭto. La vezikoj estis tute preplenaj, kaj la tuboj, je kiuj ili finiĝis, estis forte alpremiĝintaj al mia kolo kaj tiu de l'infano. La dubenigra ŝmiraĵo alprenis baldaŭ la staton de seka gumo. El inter la metal-fadenoj formantaj la aparaton eliĝis du tre dikaj, longaj kaj fortikigitaj, kiujn la sanigisto nun ekprenis ambaŭmane. Fine li ektiris, kvazaŭ li volus ilin disigi, kaj tiam mi eksentis en la kolo, je la flanko de la kupo, akran doloron, kvazaŭ iu min profunde vundis.

La infano samtempe terure ektemis.

Poste mi vidis jam nenion. Io kvazaŭ nubo pasis super miajn okulojn kaj min ŝajne blindigis. Mi nur aŭdis, ke Juan Manuel frotis siajn manojn kaj diris:

— Jam ĝi batas, jam ĝi batas. Dudek jarojn mi pensis kaj meditis pri tio! Ne enpenetras aero; la aero estas venkita, ankaŭ la doktorojn mi venkos. Jam ĝi batas! Ĉi tie estas du korpoj kunfanditaj en unu solan: vivo juna revivigas alian vivon jam kadukan. Ho, kia plezuro! Unu horo kaj kvin minutoj sufiĉas!

Kiam li silentis, mi aŭdis ke li ekprenis la kruĉon kaj ree ektrinkis.

La postan tagon mi trovis min sternita en la sama lito kaj tre zorge kovrita. Malfermante la okulojn mi vidis antaŭ mi la sanigiston kiu ridetis. Mi volis paroli kaj ne povis. Mia amiko levis la montran fingron al la lipoj kaj skuis la kapon, tiel komprenigante min ke estas neeble al mi eldiri vorton.

Poste li diris:

— Ni estas feliĉaj! Jam vi havas interne de vi la regeneran sukcon. Nun vi komencas vivi, kvazaŭ vi havus nur kvar jarojn.

Kun multa zorgemo li palpis mian pulson kaj daŭrigis:

— Terura korpovarmo! La nova sango batas en ĉi tiu korpo kiel torento en putrinta muclila kanaletto. 118 pulsoj! Ho, kiom da viveco! La febro daŭros du semajnojn. Ĝis tiam vi trinkos nur lakton, kiun mi donos al vi ekde postmorgaŭ. Mia aparato estas mirindaĵo kaj mia scio — miraklo. Mia nepeto ankaŭ ripozas, kaj daŭros ankoraŭ ses tagojn, ĝis kiam li rehavos sian sanon kaj sian forton.

### III.

Oni frapis la pordon, kaj eniris mia maljuna servistino, Marí Antón.

— Kio okazis al mia mastro? ŝi demandis.

— Jen vi havas lin! Li estas iom malsaneta, ĉar hieraŭ li insistis min akompani, faletis kaj .....

— La malbenita „sagardúa”!

— Ne, la mallumo estis kulpa!

— Sed vi devis ja alveni kun sufiĉa torĉo en via kapo! Ĉu la afero pri mia mastro estas grava?

— Malmulte. Du ripoj eliĝis el sia loko. Post proksimume du semajnoj li ree estos en ordo. Ne zorgu, ĉar vi ja vidas: kion li povas timi ĉe mi?

Marí Antón foriris kontentigite.

— Bedaŭrinda maljunulino! diris Juan Manuel. — Kiom de viaj genepoj devos servi vian mastron! La „sagardúa”! He, he! Oni devos ŝanĝi en „sagardúa”n la Ruĝan Maron, ĉar se ne, ni ne havos sufiĉe por ni ambaŭ.

Li foriris por fari siajn vizitojn. Multajn tagojn li revenis ĉiuhore, por palpi mian pulson, por paroli kun si mem kaj por doni al mi lakton, metante en mian buŝon bone trempitan tukon, kiun mi suĉis avide. Mia stato estis eksterordinare stranga. Mi sentis grandan varmon en mia tuta korpo. Min atakis ĝenerala tremo, kiam mi elspiris aeron, kun malfortaj doloroj en la brusto, en la ripo parto kaj en la ŝultroj, kaj mi estis freŝa kaj kontenta, kiam mi enspiris. Iom post iom mi povis paroli kaj eksidi en la lito. Post tri semajnoj mi reiris al mia domo, akompanate de Juan Manuel. Dumvoje li diris al mi:

— Mi kredas ke via vivo estas jam garantiita por nova epoko; sed atentu bone, ke vi ne perdu ĝin! Ĉar nun vi estas elmetata, same kiel antaŭe, al iu ajn malsano aŭ akcidento kiu povus vin mortigi. Mi faris nenion alian ol plilongigi viajn tagojn, renovigante la kaŭzon aŭ la subtenon de la vivo. Sed konvenas al ni silenti kaj atendi.

Pasis kelka tempo. Mia sano kaj miaj fortoj estis enviindaj, kvankam continuadis tiu stranga sufereto en la brusto ĉe la spirado. Sed neniam mi povis konvinkiĝi, ke Juan Manuel sukcesis en siaj projektoj; tial mi konsideris la operacion kiel malprudentaĵon faritan de ni ambaŭ dum ebrieco, kaj mi esperis morti en la aĝo, kiam mortas la maljunuloj.

Post kvin jaroj mia vizaĝo estis pli rozkolora, mia pulso estis pli forta kaj, strange! la kalvaĵo, kiun mi



antaŭe havis sur la kapo, ree estis kovriĝinta per belaj blankaj haroj. Mi estis mirfrapita. Miaj fortoj kaj apetito duobliĝis, kaj la sulkoj sur la manoj ekmalaperis.

Juan Manuel, kiu tiam fariĝis 60-jara, montris sin freneza pro kontenteco. Fumante kaj observante min kun la tuta intereso kaj amo, kun kiuj artisto rigardadas sian favoratan verkon, li pasigis kun mi horojn kaj horojn.

— Kio min timigas, mi diris, estas tiu stranga kaj konstanta malbonfarto de mia brusto.

— Kaj ankaŭ min, li aldonis. — Kvar jarojn jam mi estas pensanta pri tio, kaj ne divenas la kaŭzon. Kiam iu ŝanĝas sian loĝejon, la nova ejo lin strange impresas dum kelkaj tagoj; sed fine li al kutimiĝas kaj vivas tie perfekte. Homo, je l' diablo! Post paso de kvin jaroj jam povus la sango de mia nepo esti al kutimiĝinta trakuri vian korpon.

Forpasis ree tri jaroj; mia vizaĝo ŝajnis pli ruĝa kaj mia sano, miaj fortoj estis pli grandaj. Je mia 93-a jaro mi iris ĉasi kapreolojn kun la tuta vervo de junulo. La tagon, kiam mi fariĝis centjara, ĉe mia tablo kolektiĝis ĉiuj miaj parencoj, sen dek-ok, kiuj estis mortintaj el tiuj, kiuj ĉeestis la manĝon je mia 85-a jarfesto. La sanigisto sufiĉe maljuniĝis. Lia sanstato videble malpliboniĝis, kaj nur en liaj okuloj brilis esprimo de vicleco kaj markita kontenteco, laŭ kiu mi elkomprenis, kiom li ĝojis kaj kion li esperis min observante. La bedaŭrindulo apenaŭ trinkis plu „sagardúa”n. Mi daŭrigis ĝin konsumi je sennombraj glasoj.

lun matenon, tre frue, li venis al mia domo, enŝlosis sin kun mi en la ĉambro kaj diris:

— Ĉu vi nun konvinkiĝis?

— Jes, amiko; mi estas tutege konvinkita.

— Do bone. Se ni atendos pli longtempe, ĉio malsukcesos. Mi sentas min tre malforta, kaj se mi devas diri al vi la veron: mi ne konformiĝas morti, tenante en mia mano la vivon. Sed ekzistas malfacilaĵo; ĉi tie ni ne povos daŭre vivi, por ripeti kaj ekspluati mian eltrovon. Oni persekutus nin senkompatate. Do, vi devos fari grandan oferon al mi. Ni iru Francujon!

— Francujon?

— Jes. Tie ni ĝuos pri nia miriga konkero. Tie mi enkondukos vin en mian sekreton, vi faros al mi la operacion, kaj se ĉio sukcesos, ni konigos ĝin publike post cent jaroj.

— Mi ŝuldas al vi ĉi tiun duan vivon kaj obeas.

Mi prenis kelkajn mezurojn (sitelojn) da ormoneroj, kiujn mi estis gardinta; ni aĉetis du bonegajn mulinojn, kaj sub la preteksto ke ni iros por plenumi sanktan promeson al la Virgulino de Arraso, ni ekvojaĝis al la landlimo.

#### IV.

En Bordeaux ni fiksitis nian loĝejon, kaj Juan Manuel komencis instrui min pri la sekreto. Mia inteligenteco, male al perdiĝo, aperis pli klara, kaj mia vidpovo, antaŭe malmiopa, fariĝis normala. Cetere, por diri la veron, mi sentis kiel internan punon la penson, ke mi neniam mortos. Kiam mi rimarkis ie enterigon, mi kaŝis min en pordo-aperturo aŭ eniris alian straton, kvazaŭ konsiderante min kulpa pri tio, ke mi ne montris la manieron ne morti al tiu, kiun oni forportas sur la ŝultroj.

Miaj haroj iom post iom nigriĝis, kaj mia apetito fariĝis pli granda ĉiutage. Juan Manuel estis tute mirfrapita. Mi, havante 106 jarojn, ŝajnis multe pli juna ol li; lia teruro atingis altegan gradon, kiam mi konfesis al li, ke estas al mi tre simpatia la filino de nia hotel-estrino, Mademoiselle Basurt, kaj ke mi inklinas ŝin edzinigi.

Pro tio ke ĉio en nia mondo diskonigiĝas, la tuta urbo ekscitiĝis, kiam trakuris ĝin la sciigo, ke homo 106-jara intencas preni edzinon. Oni turmentis min per demandoj, oni sieĝis min, min desegnis, kaj mia loĝejo ŝanĝiĝis je Babelo.

— Via frenezaĵo povos esti tre multekosta al ni, diris kun granda malĝojo la sanigisto. — Nun, kiam mi ekpretiĝis esti operaciata de vi, tra la tuta urbo disvastiĝis la sciigo pri via aĝo, kaj en tuta Francujo oni tre baldaŭ parolos pri vi. Mi estas profunde malkontenta, kaj mi decidis vin forlasi kaj morti pro ĉagreno, se vi ne aŭskultos min.

La kompatinda maljunulo ekploris kaj daŭrigis:

— Ĉu vi volas min aŭskulti?

-- Jes, mi estas tute la via.

-- Do bone. Forlasu Mademoiselle Basurt! Forgesu ĉi tiun sensencan amon! Ni forkuru, ni forkuru de ĉi tie!

-- Kien?

— Al iu ajn el la amerikaj ŝtatoj. Post alveno vi operacios min, kaj ni vivos en tiu lando samlonge kiel la riverego Amazono.

Mi adiaŭis mian ĉagrenitan sinjorineton tiel diplomate kiel mi povis, lasante al ŝi luksan donacon, kaj preskaŭ sekrete ni forvojaĝis al Verakruco, per angla ŝipo.

Dum la transveturo, kiam la maristoj babilis en sia lingvo, ni, kuŝante en nia kajuteto, diskutadis amike, ĉiam okupate pri la sama temo.

— Kion mi ne povas klarigi al mi, kio min frenezigas, diris la sanigisto, estas tiu kompleta regeneriĝo, kiu okazas en vi. Estis tute nature, ke post mia mirinda laboro konserviĝos viaj maljunulaj trajtoj, ke viaj blankaj haroj kaj via kalvaĵo restos, ke vi samgrade vidos, kaj ke via stomako kaj aliaj organoj ne pliigos sian aktivecon, ĉar la nova sango povus maksimume daŭrigi senlime vian tiaman staton. Sed, ho mia Dio! okazas ĉio mala! Vi ĉiutage estas pli juna, pli forta kaj pli plena de vivo!

— Min, mi diris, alarmetas ĉi tiu kompleta revolucio, kiun mi havas en mia brusto.

— Ne kredu, ke mi ĝin forgesis, kaj multajn noktojn, kiam mi ekpensis pri tio, mi turnis ĝin tiom, tiom ofte en mia kapo, ke mi timas freneziĝi.

Kaj rec, senvarie, li komencis paroli al mi pri sia aparato, siaj intencoj, siaj esperoj, sia gloro.

Iun posttagmezon, dum mi, etendite sur mia mallarĝa lito, dormis la sieston, li venis al mi kun okuloj elkaviĝintaj, ekskuis min forte, igis min leviĝi, iris kun mi al la ferdeko al soleca flanko kaj, kaptinte min ĉe la kolo, li komencis atente ekzameni la cikatron, kiun mi konservis de la fama punkto de l' operacio. Post kelkaj momentoj li lasis sin fali en miajn brakojn kvazaŭ neniŝinte kaj, sekiginte larmon per la mandorso, li diris al mi:

— Bone ni faris tion!

— Kial?

— Malbenita vino!

— Kial?

— Teruro, teruro, teruro kaj milfoje teruro! Vi estas tre malfeliĉa, amiko mia!

— Sed kion vi diras? Kion vi malkovris je mi?

— Venu, venu!

Kaj li kaptis min per siaj konvulsiaj manoj, kaj ree ni iris malsupren al nia kajuto.

— Fine, li ekkriis, mi trovis la klarigon de via doloro, de l' malnormala stato de via spirado kaj de via time-miriga regeneriĝo. Terure! Kiam, en tiu neforgesebla nokto, mi injektis en vin la sango de mia nepo per mia mirinda aparato, mi estis iom ... nu, tiel, iom ...

— Ebrieta, ĉu?

— Jes, tiel estis, ebrieta. Malbenita „sagardúa"! Vi estis malplena; viaj vejnoj kaj arterioj, post la granda sangelfluo, estis kunfalditaj kiel malseka ombrello: per injekto ili estis akceptontaj la revivigan torenton de l' sango de mia nepo. Malbenita vespermanĝo! Farante la operacion mi vundis per mia aparato mian nepon en arterio, kaj al vi, ho efektoj de la ebrieco! al vi mi malfermis vejnon. En viaj vejnoj kuras sango arteria, kaj en viaj arterioj — sango vejna! Kion fari? Restas nur vin regeneri! Kompreneble devas dolori via brusto, kiam vi spiras. Via sangocirkulado funkcias inverse. Same vi vivas inverse al la aliaj homoj. Via organismo estas rekonstruiĝanta, male al tio kio okazas al la ceteraj. La tuta homaro moviĝas direkte al la Tago de la Lasta Juĝo; vi, kontraŭe, iras direkte al la sesa tago de la Kreado. Ni devas ĝustigi la kalkulon!

Kaj li ekkalkulis per siaj fingroj.

— Ni eraris, li aldonis. — Vi ne havas hodiaŭ 106 jarojn, vi havas nur 64, ĉar estas necese nombri malantaŭen ekde la tago de l' operacio. Vi estas 12 jarojn pli juna ol mi. Malbenita „sagardúa"! Viaj koro kaj pulmoj funkcias inverse. Kiam vi enspiras, estas kvazaŭ vi elspirus, kaj inverse. Jesuo, Jesuo! Mi fariĝas freneza. Pardonu min!

— Sed, homo, kiom gravas tio? mi diris. — Mi fartas bone. Kio povos okazi al mi?

— Malfeliĉulo! Kio povos okazi al vi? Vi havos 60 jarojn, poste 50, tiam 40 ... kaj ...

— Sed, ĉu oni ne povas tion rebonigi?

— Neeble! Vi estas kazo, kiun neniu studis, kiun neniu doktoro aŭ medicinisto iel ajn antaŭvidis, kiun neniu verko priskribas, kiun neniu imagis, kaj pri kiu neniu homo parolis nek aŭdis paroli. Pri vi oni povas skribi la plej originalan, kio iam estis skribita en la mondo. Por vi ne ekzistas scienca praktiko. Vi estas vivanta paradokso, pozitiva absurdo, reala neeblo. Pardonu min!

— Do ...

— Do por mi vi estas kazo mulsukcesinta. Vi operacios min, trinkinte nek „sagardúa"n nek vinon, kompreneble!, post du tagoj de nura trinkado de klara akvo, ĉu vi komprenas? Kaj poste ni vidos, ĉu mi, observinte vin bone, povos vin kuraci. Sed ne, ho ne! Neeble! Neeble!

— Kaj kion ni faros?

— Kion ni faru? Plori!

Kaj Juan Manuel eligis larmojn grandajn kiel pugnoj; mi opiniis, ke mi ankaŭ devas plori kun li, kaj ploris.

Iun nokton, mallonge antaŭ la alveno en Verakruco, terura ventego dispecigis nian ŝipon. La sanigisto, ĉirkaŭprenante la keston kiu enhavis lian aparaton, ligis sin al trabo, kiun mi povis kapti, kaj dum du horoj ni estis ludilo de la furiozaj ondoj.

— Mi ne povas plu! ekkriis la kompatinda maljunulo, mi ne povas plu!

— Kuraĝon! mi kriis al li. — Ne mortu nun, kiam vi staras antaŭ la sojlo de la nova vivo. Kuraĝon! Morgaŭ ni atingos la bordon, kaj baldaŭ vi estos nemortema.

— Neeble! li respondis. — Estu feliĉa! Prenu! — kaj li transŝovis al mi la keston.

— Kuraĝon, ankoraŭ estas tempo! mi ripetis, sed samtempe akvopuŝo nin ŝetis en ondo-abismon.

Kiam mi ree naĝis supre, alpremite al la trabo, por ĉiam estis malaperintaj Juan Manuel kaj lia kesto.

Baldaŭ poste boato el Verakruco savis ĉiujn ŝiprompigulojn, kiuj transvivis.

La sekvintan tagon mi troviĝis sidanta en gastejeto de la urbo, kun mia pipo inter la dentoj kaj la kapo apogita en la manoj, malĝoje meditante.

— Mi mizerulo! 106-, ne, 64-jara, kaj daŭre pli juna; kaj Juan Manuel kun sia sekreto sur la marfundo! Sola en ĉi tiu nekonata lando ... t.e. sola ne, ĉar mi konservis ankoraŭ ĉirkaŭ la korpo zonaĵon plenan de oro. Eble mi freneziĝos! La sanigisto estis prava; mi vivas inverse al ĉiuj homoj. Mia imagpovo kaj mia pensmaniero ankaŭ devos iri inverse. Mi konsultos mediciniston; sed li ne komprenos, ne kredos min. Ĉu returnvojaĝi al mia bieno? Neeble! Oni kredus min animo kondamnita.

Tiamaniere mi batalis longtempe kun mi mem, ĝis kiam mi, venkita de dormemo, ekdormis sur la tablotuko antaŭ mi, plena de paneroj.

Kelkajn tagojn poste mi interkonsentis kun karavano de mulistoj kaj ekvojaĝis Meksikon. Por kio? Por nenio! Por vivi kaj pensi pri mia malĝojiga sorto. Tramarŝante nokte tiujn belajn kaj fruktodonajn valojn, plenajn de vivo kaj de kreskajaro, dum miaj vojaĝkunuloj kantis laŭ la takto de l' sonoriletoj de la mularo — kiom da fojoj mi pensis, kiam mi ekrimarkis ĉe la horizonto la ununajn brilojn de l'tago, forviŝante kaŝitan larmon:

— Ho, la suno! Kiam ĝi releviĝos, mi estos unu tagon pli juna. Morgaŭ estos por mi hieraŭ, kaj la venonta jaro — la pasinta!

En Meksiko mi aĉetis bienon kaj du servistojn, kaj vivis tie 15 jarojn, distrante min per legado kaj meditado.

Neniam mi laboris pri io. Kial labori? Konstante mi aŭdis diri miajn najbarojn: „Kiam mi estos maljuna, mi estos kolektinta kapitaleton, kiun mi hodiaŭ formas per mia laboro, kaj mi vivos bone.” Mi, kontraŭe, pensis ĉe mi: „Kiam mi estos juna, ne mankos iu blindulo, al kiu mi servos kiel gvidanto, kaj kiam mi estos malgranda infano, mi trovos ankaŭ iun bonan virinon, kiu mamnutros min.”

Kiam mi havis 49, t.e. 121 jarojn, mia transformiĝo estis kompleta. Bela nigra barbo falis ĝis la brusto; miaj okuloj brilis plenaj de varmo kaj vicleco. Mia muskolaro ŝvelis pro forto kaj aktiveco, kaj dum miaj indianaj servistoj maljuniĝadis, mi estis tute perdinta mian en maljunaĝo formiĝintan ĝibon kaj mian sulkecan aspekton.



— Mastro hispana tinkturas harojn kaj gladas vizaĝon; diris servisto, kiu min konis de mia 60-a jaro.

— La viskajano ŝajnas ĉiutage pli juna, pli belspekta, ripetadis la virinoj de mia kvartalo.

Estis inter ili, cetere, brunulino 30-jara, kiu min tutegge sorĉis per sia ĉarmo. De tempo al tempo ni plezurigis unu la alian per donacetoj, kaj fine ni malkovris, ke nia amo estas reciproka, ke ni amegas unu la alian. Mi pensis edziĝi, sed kiel ĉiam mi, malfeliĉegulo, deklaris min venkita.

— Post nelonga tempo, mi pripensis, mi havos ŝian aĝon kaj ŝi la mian, kaj malmulte poste niaj gefiloj estos pli aĝaj ol mi. Se ŝi konus mian veran aĝon! Sed kiu estas mia vera aĝo? Ĉu tiu kiun mi havas de mia naskiĝo? Ĉu tiu kiun mi havas hodiaŭ, aŭ tiu kiu mankas ankoraŭ al mi por rekomenci? Kiel oni nombro tion? Mi povas nek ami nek edziĝi nek revii nek vivi! Mia morala turmento estas nesuferebla, kaj estas necese ke mi finu!

Decidinte ke oni min mortigu, mi iris kiel volontulo kun la soldatoj, kiujn sendis la Vireĝo en 1821 kontraŭ indianoj ribeliĝintaj ĉe la rivero Guirrimani; ĉiam mi batalis en la lokoj de l' plej granda danĝero, sed sagoj, kugloj, lazoj kaj ŝtonoj de l' malamiko min indulgis.

Post fino de la ribelo mi amikiĝis kun la indianoj, kaj mi dediĉis min, kun aliaj kunuloj, al la vivo de ĉasisto en la tieaj praarbaroj. Tre baldaŭ tiuj simplaj homoj kredis min saĝulo. Mia longa sperto, miaj aventuroj, miaj receptoj kaj, antaŭ ĉio, miaj multaj konoj, kies posedon mi montris al ili sen la klarigo de l' sekreto de mia vivo, ekstreme mirigis ilin. Tamen ili rigardis min kun multa malkonfido, ĉar ili ne sukcesis kompreni, kiel

mi scias tiom kaj donas informojn pri ĉio, kaj kial mi, estante tiel maljuna, ŝajnas tiel juna kaj tiel fortika. Inter ili ĉiu ajn havis sian kromnomon, kaj ankaŭ al mi ili baldaŭ aplikis tian. Ili nomis min Yhokerroytcho, t.e. „la granda mensogulo”.

Dudek jarojn mi restadis en la praarbaro. La stranga miksaĵo da emocioj en tiu sovaĝa vivado (kiu, se mi ĝin priskribus, formus admirindan libron) kaj miaj ĉiutagaj abstraktaj meditadoj pri mia fiziologia stato tutege ŝanĝis mian karakteron. Tre maldolĉiĝis mia animstato laŭ la grado kiel mi fariĝis juna, kaj mi vivis en kreskanta malpacienco, nerva eksciteco kaj konstanta febro, se oni juĝus laŭ la stato de mia pulso.

Mi estis kolektinta, sen laboro, ĉirkaŭ duonan milionon da duroj (kvinpesetoj), kaj mi rigardis ilin same indiferente kvazaŭ ili estus sitelo da kaŝtanoj. Nur je unu okupo mi trovis plaĉon, ĉar ĝi kunligis min kun la distraĉo kaj la historio de mia tuta vivo: je la kutimo fumi mian malnovan kaj grasecan pipon el la bieno de Gusurrandi.

Enuante pri la sovaĝa mondo, mi nun decidis transloĝiĝi Usonon, por prezenti min tie al la plej saĝa kuracisto. Mi pensis klarigi al li ĉion, kion mi rememoris pri la aparato de Juan Manuel, kaj submeti min al nova injekto bonsukcesa, tuj kiam ni estus trovintaj la sekreton. Mi adiaŭis miajn bonajn kunulojn de la praarbaro, kiuj min superŝutis per donacoj, ĉirkaŭprenoj kaj bondeziroj. Mi forlasis la belajn kaj neforgeseblajn regionojn de Kesuho, travojaĝis Kansason, Kentukion, Ohion kaj Pensilvanion; la 5-an de Junio 1841 mi luis luksan ĉambron en New-Haven Street, oka sekcio, strato 18, en Nov-Jorko.

## VI.

Mi havis tiam, nombrante direkte al la Lasta Juĝo, 141 jarojn, kaj nombrante direkte al la Kreo de l' mondo, 29. Oni prezentis min al D-ro Ph. R. Clerk-Maxwell. Aŭdinte la kaŭzon de mia konsulto, li ekhavis la plej strangan mienon, kiun povas havi jankio (Yankee), kiam oni donas al li piedfrapeton. Li esploris mian tutan korpon, miajn dokumentojn, miajn rememoraĵojn el tiom da diversaj aĝoj. Li palpis mian jam menciitan cikatron. Li instigis min desegni similaĵon de l' aparato de la sanigisto, kaj fine li restis en ekstazo, rigardante min fikse dum kvarona horo. Poste li skuētis la ŝultrojn, suprentiris la brovojn, larĝigis la lipojn, samtempe eligante la langon, kaj konklude diris:

— Revenu morgaŭ!

Efektive mi revenis kaj trovis en lia laborĉambro ankoraŭ du gravajn doktorojn, kiuj ĉe mia eniro fiksitis sur min siajn okulojn, rigardegante min tra siaj orbitaj okulvitroj. Mi denove rakontis al ili mian historion. Unu el ili faris notaĵojn. Kiam mi finis, unu rigardis la alian, farante gestojn de eksterordinara miro. La desegno de l' aparato de Juan Manuel estis la favorata objekto de ilia diskutado. La honorinda Clerk-Maxwell ordonis al mi resti en lia domo, intencante ekzameni ĉiujn observaĵojn kaj spertojn pri mia stato.

Tio daŭris du aŭ tri semajnojn; dum ili li nutris min ĵen per nura akvo, ĵen per butero kaj kolomba brustaĵo, ĵen per nutro-amelo kaj grandaj pecoj da rostita viando, kiujn li igis min gluti preskaŭ perforte. Li faris el miaj brakoj tre grandajn sangellasojn kaj submetis la sangon

al sennombro da analizoj kaj provoj. Ĉiutage venis, por min vidi, kvin aŭ ses novaj doktoroj. Clerk havis en sia domo veran porprelegan salonon, kien li kondukis min post paso de la tri semajnoj; tie mi trovis specon de medicinista kongreso, kiun prezidis iu „Mister” maljuna kaj respektinda.

Mi eksidis kontraŭ ili, kiel akuzito en tribunalo, kaj Clerk legis sciencan informon certigantan, ke reale mia ekzistado estas mistero, kaj ke mi devos submetiĝi al observado de kvin aŭ ses jaroj, en oferediĉo al la scienco. Konfuza murmurado akceptis liajn lastajn parolojn. Poste leviĝis la honorinda „siro” Down-Shouard kaj prelegis kontraŭinformon asertantan, ke mi estas freneza, havante specon de mensmalsano ankoraŭ ne determinita, kaj ke miaj notaĵoj, miaj rememoraĵaj estas produkto de malklara kaj fatala imagopovo.

Protestis kelkaj doktoroj; la prezidanto apogis la lastediritan juĝon. Du horojn ili interdisputadis, kaj post infera miksaĵo el krioj, sonoriltintoj, insultoj, minacoj kaj tiu kaj tiu kapofrapo, oni voĉdonis pri ĉi tiu punkto, kaj..... mi estis deklarata freneza, kaj kun mi ankaŭ D-ro Clerk, per ok voĉoj kontraŭ kvin, jenc:

Jesis: G. Klein, Rass, Nilhewer, Pretswich, Rham, Thompson, Down kaj Ghothars;

Neis: Clerk-Maxwell, Fhiis, Williams, Fegel kaj Thieppe.

Sin detenis: Fredfield, N. Feeldt kaj Turglion.

Veninte al mia gastejo, mi trovis tie la fakturon de la doktoro.

Liaj eksperimentoj, traktado, nutrado kaj ekspertaĵo estis taksitaj je ok mil duroj. La vizitoj, konsulto kaj

ekspertaĵo de liaj kolegoj, same de tiuj, kiuj voĉdonis por, aŭ kontraŭ, aŭ sin detenis, sumiĝis entute (en ĉi tiu demando ili ŝajne estis unuanimaj) je dudek mil duroj. Mi ne estis gardinta min konfesi al „mister” Clerk, ke mi estas milionulo. Koscience mi pagis ĉion, kaj mi fartis pli malbone ol antaŭ la konsulto. Mia sanstato estis pli deprimita, mia malnormala ekzisto sen ia kontraŭrimedo, kaj mia monujo iom pli elĉerpita. Mi aĉetis bileton por ŝipo al Hispanujo, konvinkite ke la kompatinda sarĝisto Juan Manuel sciis pli ol ĉiuj tiuj doktoroj kune, kaj mi ne pensis pri alia afero ol pri la realigo de mia tutviva revo: morti en mia patrujo, en mia bieno de Gusurrandi.

## VII.

Kiam, en la haveno G., mi metis la piedon sur la teron, ĉirkaŭis min du polic-agentoj kaj kondukis min en malliberejon.

Kial?

Vojaĝkunulo, perfekta kavaliro laŭaspekte, al kiu mi pruntedonis dum la alveturo iom da mono, ĉar ni rilatis iom pli intime, estis min denunciinta al la ŝipestro dirante, ke mi estas famkonata ŝtelisto, kiu venas Hispanujon kun la kaso de granda amerika komerc-societo. Mi protestis antaŭ la tribunalo kaj donis pruvojn de mia senkulpeco; sed ĉar mi ne povis prezenti atestantojn kaj ĉar, malfavore, oni trovis ĉe mi multan monon, la Justeco fermis siajn okulojn aŭ malfermis ilin tro multe; diskuris en la juĝejo la novaĵo pri la trovo

de granda fripono; oni metis min en ĉelon, komencis amasigi impost-stampitajn paperojn; oni ne esploraŭdis min, dum oni dissendis ĉiuf flanken senutilajn skribaĵojn, kaj mi restis kvazaŭ enterigita dum longa, tre longa tempo.

Oni rakontadis pri mi centon da imagitaj aventuroj, kaj eĉ la blinduloj kantis en siaj strofoj la mensogan devenon de la miliono, kiun mi portis ĉe mi. La bruo, kiun mia proceso faris komence, estis grandega. Partoprenis en ĝi, mi ne scias kial, tiom da juristoj, kiom da medicinistoj estis min studintaj en Nov-Jorko. Kelkfoje mi intencis skribi al mia hejma loko, por ke sin prezentu kelkaj personoj, kiuj garantius pri mi ... sed kiu ankoraŭ vivus el tiuj, kiuj min konus! Kaj se vivus ankoraŭ iu, kiel li povus min koni? La ĉelgardisto ĉiam rigardis min kun granda singardo, kaj nur malfacilege mi atingis, ke li donis al mi paperon kaj ilojn por skribi miajn memoraĵojn. Li portis la foliojn al la juĝisto, sed ĉar ili estis skribitaj vaske, tiu eĉ ne sukcesis eklegi kaj resendis ilin al mi, dirante al mia severa gardisto, ke mi diras en ili nenion, kaj ke tio estas la laboro de frenezulo. Konklude la ĉelgardisto duobligis sian atenton, metante min en ĉelon kun duobla pordo, kaj servis min tra truo ĉe la sojlonivelo.

Mi ne scias, al kiu venis la ideo ordoni vizitadon de mia malliberejo. Kiam oni alvenis al mia ĉelo, la gardisto, elpuŝante krion de mirego, returnsaltis timigite. Li estis enŝlosinta homon 30-jaran, altan, ruĝkoloran, kun lia tuta barbo, kaj li trovis junulon de 18 ĝis 20 jaroj, preskaŭ sen unu haro en la vizaĝo, kaj envolvitan en la ĉifonoj de siaj malnovaj vestoj, kiuj, verdire, estis al mi tre vastaj.

Oni ree irigis min antaŭ juĝiston, kaj tiam mi eksciis, ke mi estis enfermita pli ol dek jarojn, kaj ke el mia mono el Ameriko restis eĉ ne unu ero. La justec-administro estis uzinta ĉion „por elkristaligi la veron”. Tio, kio rezultis el tiu ĉi nova esploro, farita kaŭze de tiu laŭtempa vizitado, estis: mi ne estas mi, la kaptita milion-ŝtelinto eskapis kaj lasis min en sia loko. La ĉelgardisto estis deklarata kunkulpulo de la anstataŭigo, kaj oni enfermis lin. Min oni liberigis, ne povante konstati, kiu estas tiu nova „mi”, kiun oni trovis en mi. Ĉiudirekten oni sendis demandskribojn, por trovi tiun „mi”, kiu estis malaperinta, sed ne trovis lin.

Kiel ili povus lin trovi! !

Piede, kaj preskaŭ almozpetante mi revenis al mia hejmloko. Mi demandis, ne dirante kiu mi estas, pri tiuj, kiuj devis esti miaj gefiloj, kaj oni montris al mi miajn genepojn jam edziĝintajn. Mi trairis mian domon kaj mian ĝardenon kaj kisis centfoje tiujn ŝtonojn, kiuj antaŭ jarcento estis atestantoj de miaj ĝojoj.

Plena de profunda malĝojo kaj kvazaŭ hontigite mi forkuris. Se mi estus dirinta kaj asertinta, kiu mi estas, kiu tion kredus? Tiel farinte, mi certe ree estus metita en malliberejon aŭ frenezulejon, persekutite de la miaj.

Mi reiris Madridon, kie dum 12 jaroj mi estis servisto, mesknabo, alumetisto, gazetvendisto, ŝupurigisto, sablisto kaj mi ne scias kio pli. Dum tiu tuta tempo mi daŭrigis skribi miajn memoraĵojn kaj fumi mian amatan argilan pipon. Mia inteligento konserviĝis kaj ankoraŭ nun konserviĝas klara, sed ĉiutage mi havas pli malbonan manskribon. Mi kredas ke fine mi nek scios nek povos skribi. Estas nature.

En 1863 mi havis sep jarojn, aŭ 163 jarojn. Hodiaŭ mi estas sesjara. Mi estas reduktita al multe malpli ol mia antaŭa alto; elfalis miaj dentoj de maturulo kaj aperis la unuaj. Belegaj blondaj haroj kovras mian kapon, kaj la kapablo de mia komprenpovo neniĝas samgrade kiel miaj fortoj; miaj infanaj inklinoj ...

Marŝante, ĉiam marŝante kaj multe suferante mi revenis al mia hejmo. Mi kutimas diri, ke mi estas orfa kaj malriĉa, kaj oni donas al mi almozon en ĉiuj domoj. Sed mi estas kontenta, ĉar kvankam mi petas almozojn — kiom konsole estas vivi apud la domo, kie oni naskiĝis!”

(Ĉi tie la manuskripto estis tre makulplena, kaj poste ĝi diris, per skribo apenaŭ legebla:)

„Estas neeble al mi teni la plumon nek mi sukcesas meti unu literon apud la alian. Mi ne scias, kio okazos al mi. Mi nur petas tiun, kiu min trovos iutage, kiam mi jam ne povos ion peti nek manĝi, se li legos ĉi tiujn paperojn, ke li prenu kaj portu min en la domon de Gusurrandi, ĉar tie mi deziras morti.

José Antón.”



Dum mi legadis, estis ekstarintaj, terurite, la virinoj kiuj min ĉirkaŭis. Farante gestojn de miro kaj de timo, ili ofte sin krucesignis. Kiam mi finis, ili ekkriis ĥore:

— Jesuo! Jesuo! Sankta Barbro benita! Neeble estas kredi tion! Maleble!

La dommastrino svenis en la brakoj de sia edzo.

— Satano estis ĉi tiu kreitaĵo, sinjoro! diris al mi Gusurrandi en sia duonvaska lingvaĵo.

— Ne, amiko mia, mi reiris al li, li estis via praavo.

La virinoj denove sin krucesignis kaj ekforkuris. Gusurrandi min demandis pri tio, kion konvenus fari.

— Nu, nenion! mi diris. Trankviligu vian edzinon kaj forgesu ĉion!

La sekvintan tagon mi adiaŭis ilin.

Ĉiuj virinoj ĉeestintaj la kunvenon songis en tiu nokto, ke Juan Manuel la sanigisto, komplete ebria, metis al ilia gorĝo sian aparaton.

FINO.




---

FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

## ENHAVO DE LA 1a M.E.B.-SERIO.

- No. 1 **J. Glück, La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo.**
- „ 2 **M. J. Lermontov kaj D. N. Mamin-Sibirjak, Rusaj noveloj.** Tradukis A. Filatov.
- „ 3 **Teo Jung, De muheddin ĝis mundilatin.** Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.
- „ 4 **J. R. Scherer, Tra Usono kun ruliĝanta hejmo.**
- „ 5 **J. Glück, El la klasika periodo de Esperanto** (Grabowski kaj Kabe).
- „ 6 **Zamenhof, Kongresparoladoj.**
- „ 7 **Zamenhof, Kongresparoladoj.**
- „ 8 **A. Petöfi, La avo.** (El la hungara originalo tradukis Ladislao Spierer.)
- „ 9 **R. B. de Bengoa, La ĵusnaskito.** (Nekred- ebla historio. El la hispana originalo tradukis José Fernando Berenguer).
- „ 10 **Jubilea kongreso en Krakovo (1912).** Rememoroj de partopreninto.

Tuta serio de dek volumetaĵoj kostas en abono 2.50 ned. guldenojn. Unuopa guld. aŭ 3 internaciajn respo

**ESPERANTO-ELDONEJO**

**MUSSES**

**PURMEREND (Nederl**